



## AFRINO

Mi estis en Sirio en la somero antaŭ la militkomenco. Ĉefe inter la kurdoj. Mi alvenis de oriento enirante el Nisebino(1) al Kamjŝlo(2), dispartigitaj de la turka limo. Ĵurnalisto de la, en Amedo(3) eldonata, kurda ĵurnalo *Azadiya Welat* tieas, kaj amiko lia gastis min. Survoje al Damasko mi fasciniĝis en Palmiro, faris mallongan devion al Libano, pluiris de Latakio ĝis la Fortikaĵo de la Kavaliroj(4) kaj fine al Alepo. Antaŭ ol forlasi la landon mi faris ekskurson al Afrino, kiu kuŝas nur 60 kilometrojn for de Alepo. De tie devenas Zinar Ala, kurdo multfoje vizitinta Eŭskion, kaj ties amikoj montris al mi la regionon, tiom malsama je la aliaj teritorioj de Roĵavo. Somere de 2010 ni publikigis en *Berria* tiujn vojaĝkronikojn, kaj la kurda amaskomunikilo Firat ankaŭ eldonis ilin, anglalingven tradukitajn.

Kontraste al la dezertoj kaj ebenaĵoj de Ĝiziro(5), la pejzaĝojn de Afrino desegnas olivarbplenaj montetoj. La afrinanoj speciale fieras pro tio kompare je la ceteraj kurdoj: pli proksime al la Mediteraneo, ili sin konsideras pli modernaj kaj malfermaj kompare al la – ŝajne – pli konservativaj kurdoj loĝantaj en la koro de Mezopotamio. La nura aleva vilaĝo – tio estas, ne sunaisma – de Roĵavo estas en Afrino.

Kiam post la unuaj komencintaj protestoj en Sirio estiĝis malferma milito, la loĝantoj de Afrino prenis la regadon de siaj vilaĝoj kaj organizis la popoldefendajn milicojn PPT(6). En 2013, kune kun Kobano kaj la orienta Ĝiziro ili deklaris la tri kantonojn de Roĵavo. Venkinte la Islaman Ŝtaton la PPT sukcesis kunigi la kantonojn de Kobano kaj Ĝiziro, kaj la alarmsignaloj eksonis en Turkio, ekkonsciinte, ke la kurdaj partizanoj kontrolas la landlimon tra centoj da kilometroj. Por ke la samo ne okazu pli okcidente, tio estas, por malebligi ke, kuniginte Kobanon kun Afrino, la kurdoj kontrolu la tutan landlimon, la armitaj bandoj subordigitaj al Turkio kaptis la teritorion inter ambaŭ kaj la urbon Albabo(7), post kiam la ĝihadistoj malhisis sian flagon ne pafinte eĉ kuglon. Kaŭze de tio, Afrino estas izolita apud la turka landlimo kaj, spite al tio, ke la tieaj milicoj uzis siajn armilojn nur por defendi la popolon kaj neniam iun ajn atakis, Recep Tayyip Erdogan de monatoj ripetadas, ke li elpelos la partizanojn.



Tiun ĉi semajnon(\*) li komencis la operacon. Antaŭe jam okazis simila friponaĵo: Ankaro ĉiam nepre bezonis denunci minacon, de jarcento vidas sin ĉirkaŭita de malamikoj. Armenoj, grekoj, sovetianoj, usonanoj, okcidenta imperiismo, dekadenca otomanismo ... historie ĝi ĉiam sciis difini tiun malamikon, por plifortigi sian nacian konscion. Temas pri ideo encerbigita en la lernejo de la unua tago, entenata en la fama moto “*ne mutlu türküm diyene*”: kiel benita mi estas, ĉar mi povas diri, ke mi estas turko.

Antaŭ dek jaroj Ankaro celis Kandilon(8), monta regiono inter la landlimoj de Irako, Turkio kaj Irano, kie la gerilo de la PLK(9) havas bazojn. Ŝajnis deviga sturmi tiujn, kiuj, fortikiĝintaj en la montaro, atakas la teritorion de la respubliko. Dum semajnoj oni bakis la publikan opinion kaj fine, kiel anoncite, oni frapis kontraŭ la PLK. Post malmultaj tagoj oni proklamis la venkon kaj la morton de centoj da “teroristoj”, kaj konsekvence la finon de la surtera operaco. Tio, kio envere okazis estis tute malsama, kompreneble: la aeratakoj dumvintre preskaŭ ne okazigis damaĝojn al la gerilo. Kaj la klopodojn surtere penetri tuje neŭtralis la PDF kaj, je la humiligigo de Ankaro, ĝi montris kaptitajn soldatojn en bona stato. Oficiale, Turkio retiriĝis el Irako pro la neĝo. “Vivu la neĝo!”, mokis la kurdoj.

Dek jarojn poste, la Turka Respubliko ree celas landlimon, je la alia ekstremo. Afrino estas la disbatenda malamiko. Miloj da soldatoj pretas por la invado; ĝis nun okazis artileriaj atakoj, kaj lasthore Erdogan anoncis, ke la operaco komencis. Sed rilate Afrinon, ju pli bojas Turkio, des malpli da eblecojn ĝi havas por vere mordi. Certe estos bataloj. Sed Turkio scias, ke ĝi ne povas kapti Afrinon. Ĝi ne povis venki la gerilanojn en Kandilo antaŭ dek jaroj; des pli riske estos bati la milicanojn, kiuj alfrontis la ĝihadistojn. En la propaganda diplomatio ankaŭ fiaskis Turkio: Rusio rifuzis retirigi siajn soldatojn el Afrino por lasi liberan vojon al la turkaj, kaj Usono petis ne invadi. Meze de la geostrategia ludo la kurdoj, ree, perdas. Sed, precipe en Sirio, ĝi devos dufoje pripensi antaŭ ol ataki la kurdojn, kiuj dum kvar jaroj alfrontis la plej timindan malamikon.



Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj)

- (1) Nisêbîn.
- (2) Qamîshlo.
- (3) Amed.
- (4) Krak des Chevaliers, en la franca.
- (5) Cizîr.
- (6) Popolaj Protekt-Taĉmentoj (Yekîneyên Parastina Gel).
- (7) al-Bab, en la araba.
- (8) Partio de la Laboristoj de Kurdio (PLK)/Partiya Karkerên Kurdistan (PKK). Ties gerilo estas la Popol-Defendaj Fortoj (PDF)/Hêzên Parastina Gel (HPG).

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Urtzi Urrutikoetxea.

(\*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 21-an de Januaro 2018-a.

Tradukis: NXC. Marto 2018-a. Provlegis: DS.

